Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 10. de l' monato.

Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio, Esperanto-Varbadservo p. Aŭstrio

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803.
Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj). Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.
Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro

N-ro 2 (151) Korneuburg ĉe Wien, la 10. februaro 1938. 15. jaro

XXXIV-a Eŭkaristia Mondkongreso en Budapest.

I-a Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno.

Kardinalo d-ro Theodor Innitzer, ĉefepiskopo de Wien, celebros la Sanktan Meson.

La Katolikaj Kultursemajnoj en Wien, antaŭ kaj post la Kongreso.

LA KATOLIKAJ KULTURSEMAJNOJ EN WIEN KAJ AŬSTRIO.

La reprezenta kaj programa aranĝo en la jaro 1938.

De kardinalo
ĉefepiskopo d-ro Theodor Innitzer.

La Eŭkaristia Mondkongreso antaŭ la pordoj de Wien — ĉi tiu signalvorto, alarmanta kaj kunveniganta la tutan katolikan mondon al eŭkaristia festo de la popoloj, devas esti aŭdata de ni aŭstrianoj katolikaj kun speciala intereso. La migrado de la mondo al Eŭkaristia Kongreso en Budapest grandparte iros trans Aŭstrio. Ni plifortigos ĉi tiun migradon el niaj vicoj — sed ni ankaŭ uzos la tagojn kaj semajnojn, dum kiuj dekmiloj da katolikoj el ĉiuj nacioj dum sia pilgrimvojaĝo traveturos Aŭstrion, por grandioza aranĝo kaj reprezentado de la aŭstria katolicismo.

La mondo interesiĝas pri la nova Aŭstrio kiel ŝtato kun katolikaj organizprincipoj. La internacia amaso de fremdlandaj pilgrimoj ekkonu la katolikan Aŭstrion vigla en ĝia kulturforto, klare montrata en ĝia nacieco kaj ĝia historio, altgrada en ĝia muziko kaj en la aliaj belaj artoj, energia en ĝia pensmaniero kaj volo. La vasta katolika mondo, kiu dum printempo 1938 venos al Aŭstrio, konatiĝu kun niaj plej bonaj tradicioj kaj plej fortaj talentoj sur artaj kaj spiritaj kampoj, ĝi vizitu sub nia gvidado la aŭstriajn lokojn de la Dia Graco, de la kristana historio, de la katolika kulturo en Aŭstrio, ĝi trovu sur niaj scenejoj la teatraĵon kaj en niaj koncertejoj la muzikon kun kristana substanco kaj kun ni konsilu pri la aktualaj problemoj de la katolika kulturo.

De la 22. de majo ĝis mezo de junio 1938 la programo de Katolikaj Kultursemajnoj donos en Wien kaj en la federaciaj landoj la kadron por ĉi tiuj aranĝoj.

Mi petas ĉiujn aŭstrianojn katolikajn unuigi volon, kapablon kaj talenton en ĉi tiu kulturfortoprovo de la katolika Aŭstrio kaj fine ankaŭ doni ilian monan subtenon al ĉi tiu ideala entrepreno.

Sed al ĉiuj pilgrimuloj en la mondo, kiuj sin preparas al la veturado al Budapest, jam hodiaŭ mi alvokas: venu dum via vojaĝo al la katolika Aŭstrio, ĝi montros al vi la antikvan nobelecon de sia katolika



Ĉenponto en bela Budapest

kulturo, la junan movoforton de sia katolika koro, la verkojn de siaj vivaj talentoj. Festu kun ni modernan kaj laŭ longa tradicio aranĝitan feston de katolika kulturo.

Aŭstrio malfermas siajn pordegojn al la partoprenantoj en la 34. Internacia Eŭkaristia Mondkongreso. La katolikaj muziko kaj poemarto, la kristana teatro kaj ĝia bela arto, la famaj abatejoj, monaĥejoj kaj pilgrimejoj, la spirita kaj arta eminentularo kaj la nacieco de Aŭstrio en sia profunda katolika pensmaniero vokas la mondon al la Katolikaj Kultursemajnoj dum majo kaj junio 1938 al la katolika Aŭstrio!

En la kadro de ĉi tiuj kultursemajnoj okazos la estrarkunsido de Internacia Unio de Katolikaj Virin-Ligoj kaj la Tutaŭstria Katolika Virinkunveno. Trad. Steiner.

*

1-a EUKARISTIA ESPERANTO-MONDKUNVENO.

Kardinalo d-ro Theodor Innitzer,

Ĉefepiskopo en Wien, celebros la Sanktan Meson la 27. de majo en Budapest.

XXXIV-a Eŭkaristia Mondkongreso okazos en Budapest, Hungarujo, inter 26.—29. de majo 1938.

La tuta katolika mondo solenas ĉiun duan jaron en alia urbo sian Eŭkaristian Mondkongreson kaj tiuj kongresoj estas sendube la plej grandiozaj religiaj demonstracioj de la nuna epoko.

La nombro de la sinanoncintoj por la 34-a Internacia Eŭkaristia Kongreso estas tiom granda rilate al la disponeblaj loĝlokoj, ke oni baldaŭ estos devigata rifuzi la akcepton de pluaj aliĝoj.

Kiu volas ĉeesti, do kiel eble plej baldaŭ aliĝu!

La 1-an Eŭkaristian Esperanto-Mondkunvenon povas partopreni nur tiuj, kiuj unue aliĝas al 34. Int. Eŭkaristia Kongreso kaj al tiu ĉi oni povas aliĝi nur pere de la koncernaj landaj komisionoj (en Aŭstrio: Volksbund der Katholiken Oesterreichs, Prelato d-ro J. Fried; Pilgerfahrtenkomité, Direktor P. Pendl, Renngasse 6, Wien I.) aŭ, kie tiaj ne ekzistas, pere de la tieaj vojaĝoficejoj. Per tiu aliĝo ankaŭ loĝado kaj manĝado estas certigata.

Kiuj deziras ĉeesti 1-an Eŭk. Esp.-Mondkunvenon devas tion sciigi ankaŭ al Subkomitato, Budapest, Petõfi Sándor u. 9. IV. 3, aldonante 4 int. poŝtresp. kup.

Laŭ peto de la Komitato kort. kons. Steiner en Wien petis aŭdiencon ĉe Lia eminenca moŝto la kardinalo de Wien d-ro Theodor Innitzer, kiu en afabla maniero konsentis celebri la meson dum la E.-mondkunveno.

Budapest, la bele situata ĉefurbo de Hungarujo invitas vin!

Oficejo de la Federacia Prezidanto
16.871

Al la gvidanto de Esperanto-Varbadservo
por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

Vi havis la afablecon, transdoni al sinjoro la Federacia Prezidanto la lastan numeron de Via gazeto „Aŭstria Esperantisto“ kiel ankaŭ la jus eldonitan Esperanto-Tutmond-Adresaron per letero de 23. de decembro 1937. Sinjoro la Federacia Prezidanto komisiis min, esprimi al Vi pro ĉi tiu ĝentilaĵo lian plej bonan dankon.

La kabineta direktoro: D-ro Huber.

*

Oficejo de Kanceliero
Wien, 15. januaro 1938

Al la Esperanto-Varbadserbo por Aŭstrio!

Sinjoro la Kanceliero dankas tre kompleze por la afablaj bondeziroj, kiujn li plej bone respondas, kiel ankaŭ la transsendo de la gazeto „Aŭstria Esperantisto“ kun la priparolo de la libro „Dreimal Oesterreich“.

Pri tio informas vin laŭ ordono la oficejo de la Kanceliero.

*

Federacia Ministro
por Komerco kaj Trafiko

W i e n, 5. januaro 1938.

Tre estimata sinjoro kortega konsilanto!

Por la afablaj bondeziroj okaze de Novjaro kiel ankaŭ por la afabla ĝentileco, kiun vi havis la bonecon doni al mi per la alsendo de la lasta numero de la gazeto „Aŭstria Esperantisto“, mi petas akcepti mian komplezan dankon. Ankaŭ mi deziras al vi por la nova jaro ĉion bonan.

Kun la esprimo de mia
plej granda altestimo
Taucher, m. p.

*

Prezidanto
de Administra Komisiono de
Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj.

W i e n, 29. dec. 1937.

Tre estimata sinjoro Kortega Konsilanto!

Por la afabla alsendo de la lasta numero de Aŭstria Esperantisto kaj de „Adresaro de la Esperantistoj“ mi permesas al mi danki plej kore.

Samtempe mi permesas al mi sendi mian plej bonan dankon pro la afabla memoro okaze de la festotagoj kaj ankaŭ miaflanke transdoni la plej korajn feliĉ- kaj bendezirojn por la jaro 1938.

Kun la certigo de mia speciala altrespekto
Fritz Stockinger, m. p.

*

Vizito al s-ro Ministro por Komerco.

La 5. de januaro la gvidanto de Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio kortega kons. Steiner estis en aŭdienco ĉe la nuna Ministro por Komerco kaj Trafiko prof. d-ro Taucher, al kiu li raportis pri la servoj faritaj, farataj kaj farotaj al nia patrolando pere de Esperanto-Varbadservo. La Ministro dum 38 minutoj en afabla maniero priparolis diversajn koncernajn aferojn, promesis viziti la Internacian Esperanto-Muzeon dum la farota ekspozicio en la dua mezo de marto kaj ankaŭ sendi al mi eldiron pri Esperanto.

La Ministro plene rekonis la servojn de Esp.-Varbadservo kaj ankaŭ promesis laŭeble subteni ĝin.

Ni transdonis la tutan jarkolekton de Aŭstria Esperantisto 1937 kun tiel bona propagando por Aŭstrio kaj la Esperanto-ŝlosilon.

*

Radio-Wien

disponigis por **Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio,** komencante en februaro, **duan vesperprelegon.** Do de nun okazos la prelegoj, farataj de l' gvidanto de E.-Varbadservo kort. kons. Steiner **ĉiujn duan kaj kvaran vendredojn** en la monato je la 22 h 20 — 22 h 30.

Disaŭdigoj:

11. Februaro „Wien en plukonstruo“
25. Februaro „Ĉijaraj festaranĝoj en Aŭstrio“
11. marto „Aŭstrianoj en alilandaro“
25. marto „Aŭstriaj kasteloj“

Radio-Konkurso Gueritte.

Dank' al la grandanima malavareco de s-ro Gueritte ĉijare estos monpremioj de 2/2/- kaj 1/1/- funtoj por la 2 personoj, kiuj ensendos la plej bonajn raportojn pri la ricevo de E-programoj dum la konkursa periodo. Ĉi tio estas aldone al trofeo, kiu estos la gajnaĵo de la unua sukcesanto.

Laŭ la regularo: „Por la celoj de la konkurso validos ĉiuj Esp.-dissendoj aŭditaj inter noktomezo (GMT) de la 28. febr. kaj noktomezo (GMT) de la 31. marto 1938.“ La regularo havebla de Brita E.-Asocio.

Internacia E-Ligo.

Internacia konkurso 1937, finciferoj:

Laŭ poentoj plialtiĝis la membraro en **Norvegujo** je **660%, Aŭstrio 305.4, Danujo 191.1** ktp. ĝis **Hispanujo 0.7%.** La meza plialtiĝo estis 77.9%.

Fine de 1937 IEL nombris **13.487 membrojn.**

Jarlibro: ĝi aperos en marto en pli granda amplekso kaj certe ĝojigos kaj kontentigos la mendintojn! **Rapidu, ankaŭ havigi al vi ĉi tiun plezuron!**

Filia Oficejo, Stockholm.

La 15. 1. estas dissendita cirkulero 1-a al la estraroj de la Landaj Asocioj.

Universala Arta Ligo.

Sub la supra titolo fondiĝis mondorganizo, kies oficiala lingvo estas Esperanto. Ni alvokas la artistojn de ĉiu nacio al aliĝo. Celo de la organizo estas: aranĝo de internaciaj ekspozicioj, kreo de artistaj hejmoj, laborejoj, muzeoj, helpo al reciprokaj interŝanĝvojaĝoj de fremdaj artistoj kaj artamikoj. En la unuopaj landoj fondiĝos landaj grupoj kun memstara gvidantaro, kies delegitoj reprezentas en la Centro, kies sidejo estas en Paris.

Kiu volas aliĝi aŭ akcepti la taskon, fondi landan grupon, skribu al Ervin Preis, redaktoro de Mondo de l' Artisto, Budapest VII. Szövetség-u. 28/b.

E. Preis. A. Farkas. L. Rodo.

„Mondo de l' Artisto“ (la unua numero jus aperis) estas la oficiala organo de „Universala Arta Ligo“.

La ĉarmo de l' kanto.

Radio-novelo de V. O. Ludwig.

D-ro Vincenz Oskar Ludwig komencis sian eklezian karieron 1899 en Wien, 34 jarojn li estis bibliotekisto de la abatejo Klosterneuburg, profesoro en la teologia fakultato de l'abatejo. Li instruis en kelkaj mezlernejoj kaj estis dum 7 jaroj ankaŭ lernejdirektoro. Depost 1929 urbparoĥestro en Korneuburg. Li okupiĝas de multaj jaroj pri arthistorio kaj faris pri „arto kaj historio aŭstriaj“ multajn paroladojn en grandparto de Eŭropo. Distingojn Ludwig ricevis de imperiestro Franz Josef, de la registaro de Finnlando kaj la titolon „ĉefepiskopa eklezia konsilisto“. Li verkadis beletristaĵojn: „Fata Morgana“ el la tempo de la siego de Wien (1935 prezentita en Wien), Imperiestro Karl VI. (festludo, prezentita 1936 en Klosterneuburg), „Ludo en Wachaŭ“ (prez. dum la Festludoj en Spitz), „Golgatha“ (pasiona luda, kiu grandioze enscenigita multfoje estis prezentita), fama romano „En la ombro de Sankta Pietro“ (el la baroka Roma, Esperantigota!), „Napoleono en Wien“, „Muzikantoj el Malnov-Viena Biedermeier-epoko“ (bonega poemaro), „Wachauer Vaganten-Brevier“ (Breviero de vagantoj tra Vahaŭ) ktp., 500 felietonoj kaj mallongrakontoj. Profesoro Ludwig krome verkis multajn sciencajn literaturaĵojn, el kiuj la plej fama la „Altaro de Verdun“ (majstroverko en Klosterneuburg), biografioj, kultur- kaj arthistoriaj skizoj ktp. ktp. kaj bela Aŭstrio“, 600-paĝa kulturhistoria jarlibro. Kaj nun aŭskultu la poeton mem en mallonga novelo.

En la ĉambrego XI de l'urba malsanulejo komenciĝis la matenbrileto de l' fruraĝo ŝpini delikatajn, modestajn fadenojn, kvazaŭ ĝi preskaŭ ne kuraĝis veki la lacajn dormantojn, kiuj post dornoplenaj horoj fine trovis la sopiritan ripozon. Sur mallaŭtaj plandoj la juna tago ŝteleniris, tiel mallaŭte, ke ĝin tute ne rimarkis la bona malsanul-fratino, kiu — por iomete ripozi post la streĉiga dumnokta deĵorado — estis ekdormetinta sidante ĉe la tableto, kiam ŝi estis foliuminta en la preĝlibreto por mallonga matenpreĝo. La blankaj flugiloj de ŝia kapkovro, kiuj kiel sur sinjorinportreto de pasintaj tagoj pitoreske borderis la maldikan vizaĝon, ŝajnis kliniĝi ĉiam pli profunde malsupren, ĝis kiam ĉiam denove mallonga subita vekiĝo el la dormembaraso ŝin supren levis por jam en la proksima momento denove simile al granda vivmalforta malfrupapilio fali laca malsupren.

De la strato venis malforta bruo — la unuaj foirveturiloj veturis en la urbon, kiu ankoraŭ havis la okulojn fermitaj. De najbara preĝejturo frusonorileto aŭdigis sian delikatan voĉeton, multe tro frue por la turmentataj labor- kaj oficej-geuloj, kiuj ankoraŭ tiom volonte volis sonĝi pri la venonta dimanĉo, se ne estus la mizero de la vivo kaj la zorgo pro la ĉiutaga pano, kiuj ilin senkompate elpelis el la mizera, sed tamen tiel agrable varmigita ripozejo. Kaj la malica sonorileto ŝkuas ankaŭ la flegistfratinon el la ankoraŭ ne decidita luktado inter maldormo kaj dormo al la realeco de ŝia flegistindevo. Ŝi energiiĝas kaj flankenmetante la libreton ŝi rekomencas sian rondiradon de unu lito al la alia, por kontroli la malsanulojn. Ĉe unu kuŝejo observante ŝi restas pli longan tempon: ankoraŭ pli juna paciento kuŝas tie, kiu okupas ŝian tutan atenton. La forta febro ja, kiu

Balfesto de urbo Wien.



Antaŭ 30 jaroj: **imperiestro Franz Josef**, malantaŭ li urbestro **d-ro Lueger**.
Nun urbestro **Richard Schmitz** revivigis „Balfeston de urbo Wien".

Unu el la tri plej grandaj kaj preferataj balfestoj en Wien estas ĉi tiu de Urbo Wien en la gotikstila urbdomo sur Ring. Ĉi tiu balfesto tradicia havas eble la plej karakterizan kaj ĉarman elementon inter ĉiuj balfestoj dumkarnavalaj en Wien. Tion kaŭzas la en vere grandaj linioj farita kadro de la urbdomo, la bunta multspeco de la festlokoj, troviĝantaj en 4 etaĝoj de la urbdomo, de la festeco de la nekompareble bela festsalonego ĝis malsupre al la katakomboj de la urbdoma vinkelo. Krome urbo Wien ĉerpas el la pleno, ŝanĝigas la salonegojn, halojn, koridorojn, kaj ŝtuparejojn en unusolan flor- kaj palmoĝardenegon kaj kreas per tio feinejon, kian neviu alia festaranĝanto tion povas fari.

Vizitantoj de ĉi tiu balfesto diras, ke ĉiujare ili estas ĉiam denove surprizataj ĉe la rigardado de la feinaj lokoj en la urbdomo kaj de la tualetoj de la sinjorinoj.

Ne ekzistas dua aranĝo, en kiu la renovigita, tradicikonscia, je sia sendependeco kaj memdecidrajto fiera Aŭstrio tiel evidente respeguliĝas. Balfesto de Urbo Wien havas en sia societo la afablan Vienan burĝon, la nobelulojn kaj la altrangan

---

ankoraŭ la pasintan vesperon estis lin turmentinta per sovaĝa delirado, estis mildiĝinta kaj li fariĝis pli trankvila kaj fine endormetis. Sed ankoraŭ nun la vangoj brilis, ankoraŭ la arda fajro bruldolorigis en la sangoondoj, tiel ke li sin ĵetis maltrankvile de unu flanko al la alia kaj la vibrantaj lipoj ŝajnis moviĝi dum la dormado. La fratino trempis kompresojn en malvarmigantan akvon kaj metis ilin sur la varmegan frunton de la paciento. Kiel singarde ŝia lerta mano tion faris — aŭ ĉu estis eble la nun pli forte envenanta lumo de la ekvekiĝanta tago, kiu igis lin malfermi la okulojn — li vekiĝis. Nur lia rigardo ĉirkaŭvagadis malcerte en la ĉambro, kvazaŭ li ankoraŭ devus sin orienti, kie li do estas ĝis fine ĝi restis ĉe la antaŭklinita figuro de la flegistino, kiu rapidis, flustri al li trankviligajn vortojn. Per grandaj, malhelstelaj okuloj, el kiuj la febro brilis, li ŝin alrigardis, per senenergia manmovo li donis signon, ke li komprenis ŝin kaj ke ŝi ne bezonus havi zorgojn pro li... li jam volos esti tre obeema paciento kaj havi paciencon. Se la gracila korpo, kiu montris postsignojn de grandaj lacigaĵoj kaj de multspecaj seniĝoj, ne montriĝus tiel kaduka kaj la simptomoj de plena senhelpeco tiel klare esprimitaj, oni estus povinta opinii, povi ellegi el la nobla vizaĝo de persistema vivoenergio malgraŭ nedireble malĝojaj sortoj konservitan kaj ankoraŭ nerompitan volon. Sed al la sperta okulo ne povis resti kaŝite, ke jen nur plu ruinaĵo de en sortotempesto rompita vivopeto estas alportita en la lastan protektan havenon de la malsanulejo, kiel fiere kaj esperĝoja ankaŭ iam la flagrubando flirtis en la aero kaj junulenergio kaj virkuraĝo ŝveligis la velojn al plena veturado...

Nun subite hela lumstrio ŝteliĝis trans la litojn, glitrapidis transen kaj restis sur la dolorplenaj trajtoj de la malsanulo tiel, ke ili heliĝis kvazaŭ ili apartenus pli al resaniĝanto ol al iu, kiu per unu piedo transpaŝis la tempon kaj eternecon disigantan sojlon. Kaj nun la akraj linioj, kiujn ĉagreno kaj doloro profunde estis enigintaj en la vizaĝon, fariĝis pli dolĉaj kaj molaj; kiel komenco de malforta rideto ĝi ekbriletis. Sed nur por ree cedi al despli malhela esprimo. Estis kiel spegulbildo kaj rebrilo de tiuj internaj sentimentoj, kiujn ekvidis la okulo de l'animo en baldaŭ pli helaj, baldaŭ denove pli malhelaj koloroj, neimageble variaplena skalo de la okazintaĵoj. Kiel oni ofte pretendas pri mortantoj aŭ en subita mortodanĝero troviĝantoj, ke ilia tuta vivo ofte preterrapidas en seninterrompa, fulmosimile el la plej diversaj travivaĵoj kunmetiĝanta pensofilmo, antaŭ ol la animaj fortoj perdiĝas, tiel okazis ankaŭ al la bedaŭrinda malsanulo... Kio do estis pri lia vivo? Deveninta el ĉiamverdaj arbaroj kaj benitaj kampoj, kie staris la patra kastelo, envolvita en zorga mola veluro de sennuba, senzorga infanaĝo, al kiu oni donis ĉion belan, gvidita en milda, afabla edukado al ekkono de la sciindaĵoj, al kompreno de ĉiuj mirakloj de l' estado, nutrita kaj provizita el cent ĉiam disponeblaj fontoj de pli alta scio kaj de subtiligita ĝuo, ĝi maturiĝis sub ĝojdonantaj, refreŝigaj sunradioj de gepatra boneco. Jen subite ŝovis sin iutage malgaĵiga gasto en la domon. La morto estis per subita ekkapto haltiginta la koron de l' patro.

oficistaron, la reprezentantojn de arto kaj scienco, originalan aŭstrian, noble-sengênan hejmecon, sed ankaŭ brila atmosferon, kiujn la Vieno ne deziras malhavi.

Ĉeestis ankaŭ ĉijare brila societo: Federacia prezidanto Miklas, kanceliero Schuschnigg kaj la membroj de la registaro kun la edzinoj, arkidukoj Josef Ferdinand, Franz Salvator, Hubert Salvator, princo Elias de Bourbon-Parma, la membroj de la diplomatia korpuso ktp. ktp.

Urbestro, iama vickanceliero Richard Schmitz kun la vicurbestroj d-ro Kresse kaj Waldsam akceptis la gastojn.

7 muzikorkestroj ludis kaj la sinjorinoj ricevis kiel baldonacon (kutimo en Aŭstrio) albumeton por la Balfesto de Urbo Wien. La tuta arangxo estis en la manoj de magistrata sekretario d-ro Ernst Schönbauer.

Pri la beleco de la festlokoj oni nur povas ricevi imagon, se oni aŭskultas kelkajn ciferojn: Miloj de grandaj kaj malgrandaj palmoj, kelkaj ĝis 8 m altaj, miloj da florantaj arbetajoj kaj floroj kiel siringo azaleoj, florantaj ĉeriz-, prun- kaj pom-arboj, majfloroj, tulipoj kaj aliaj. Proksimume estis uzataj 3000 palmoj, 1000 laŭroarbetoj, 2000 aliaj foliplantoj, 1000 hederoj kaj pli ol 4000 florplantoj, kiuj ĉiuj estas el la reservoĝardenoj de urbo Wien.

30-a Universala Kongreso de E.

London, 30. julio ĝis 6. aŭgusto 1938.

Adreso: Sekretario de 30. Univ. Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Kotizoj: Ĝis 31. 3. 1938 Funto 1-5-0, poste 1-10-0. Edzo aŭ edzino de kongresano kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagos la duonon, plej bone en registrita letero per britaj stataj monbiletoj. En Aŭstrio vi pagu al la ĉefdelegito aŭ. ŝ. 33.—, resp. 39.50 kaj la ĉefdel. anoncos vian aliĝon al London.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpagan kongreskarton post aprobo de iliaj aliĝoj flanke de s-ro W. P. Merrick, kasisto de Blindula Ligo, Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝiloj haveblaj ĉe Int. E.-Muzeo kaj la ĉefdel. de IEL en Aŭstrio, ankaŭ ĉe via landa organizo.

Donacoj volonte akceptotaj.

Blindula kaso jam ricevis donacojn por ebligi al blinduloj la partoprenon.

Glumarkoj: Belaj glumarkoj pri la kongreso haveblaj ĉe la ĉef- kaj la delegitoj. Uzu ilin, kiuj aspektas vere belaj. Prezo por 50 nur 2 int. resp. kup.

Loĝado. Kiel eble plej baldaŭ loĝmendiloj estos dissendataj.

Hoteloj: Lito kun ampleksa matenmanĝo 4½—14 angl. ŝ. Oni intencas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

Manĝoj: La ordinara prezo por lunĉo 1—3½, temanĝo 9 pencoj—2 ŝ; vespermanĝo 1½—5 ŝ.

Fakaj kunvenoj: Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Oficiala organo: Ĉiu kongresano ricevos la gazeton The BRITISH ESPERANTIST de januaro ĝis julio kaj poste la numeron, kiu enhavos la raporton pri la kongreso.

Vojaĝ-oficejo: La oficiala estas Cook. En Aŭstrio peras ĉiujn servojn Oesterr. Verkehrsbüro, Wien, I., Friedrichstraße 7.

Presajoj. En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presajojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

Dokumentaro. La sama postulo rilatas al presajoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

Flegistino. Esperanto-parolanta flegistino dejoros en la kongresejo kaj ĉe ĉiuj gravaj arangxoj.

Membraro. Ĝis la hodiaŭa dato 825 personoj el 25 landoj.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith,
Sekretario.

XX-a Int. Kongreso de katolikaj Esperantistoj (IKUE) okazos de 6.—11. aŭgusto en Ljubljana, vidinda slovena ĉefurbo. La kongreskotizo de 50 Dinaroj (proks. 7 ŝil.) same kiel la vetur- kaj restadkostoj ne estas altaj, kio allogu multajn samideanojn, ĉeesti la kongreson. Anoncu vin tre baldaŭ. Informoj de prez. Leop. Chiba, Wien, IV., Schaumburgergasse 4, aŭ en la kunveno de KUE en Wien. Aldonu resp. afrankon.

X-a jarkunveno de LEEN.

Nederlanda E.-Asocio **„La Estonto estas Nia"** arangxos sian jubilean kongreson en la ĉefurbo Amsterdam je Pasko. Ĉiam aro da eksterlandanoj partoprenas ĉi tiujn tre belajn arangxojn. Oni povas sin anonci por 1 aŭ du tagoj (kotizo po tago 1 ned. guld.). Farotaj ekskursoj aparte pagotaj. Hotelo po nokto kun matenmanĝo de 1—3.50 guld. Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la sekretariino f-ino E. Keller, Fred. Hendrikplantsoen 104, Amsterdam-W.

Mi mem partoprenis lastjare la kongreson en Den Helder kaj nur povas rekomendi al ĉiu, travivi ankaŭ belajn horojn en la mezo de niaj nederlandaj samideanoj. Steiner.

XXVII. Belga K. de E. Charleroi 4. ĝis 6. junio 1938.

9. Flandra E-Kongreso, 4.—6. junio 1938 en Brugge, eldonis belajn glumarkojn.

18-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 7.—13. aŭgusto en Bruxelles.

Novjar-saluto el Azio!

„Por Esperanto kaj bonefika medikamento ne ekzistas landlimo.

Per la mistera orienta medikamento, plifortiga kaj rejuniga „PAEKBOHUAN" pli bonan sanon al vi en la novjaro!"

Feliĉan Novan Jaron al vi!

Heiŭado Akcia kompanio
60 Kensi-ĉo, Seoul, Koreio, Azio.

Estante nun memstara, li komence estus plene prizorginta sian oficon kiel portanto de honora tradicio de praa estimata nomo, se ne estus estintaj kelkaj konatoj de tiu sangvina tipo, ŝajnigantaj esti bonaj amikoj, kiuj per bienrento sentas sin liberigataj de ĉiu plua zorgo kaj kiuj faris malbonan influon al la ideale sentanta juna majoratulo. Unufoje venkita de la tento, trovi plezuron en la nervincita hazardludo, estis nur malgranda paŝo pli malsupren, ankaŭ ekŝati la alie al li ne konvenajn kaj monelspezajn ĝuojn, kiuj estas kutimaj en tia rondo de noblaj mallaboruloj kaj nenionfarantoj. Sed li samtempe estis sin deteninta dank' al sia bonega edukado kaj dank' al la ankoraŭ ĉiam daŭranta, bonfara influo, kiun lia altanima, nur iomete ne sufiĉe energia patrino faris al li, de pli grandaj el-reliĝoj kaj estis restinta bona filo. Li estis enamiĝinta. Rapida, hazarda konatiĝo kun fraŭlino el bona, sed senkulpe malriĉiĝinta familio, estis kondukinta al korinklino, kiu plene estis kapabla, doni al lia vivo fortan apogon, lin gardi kontraŭ junulaj petolajoj kaj tamen konservi al si ankoraŭ la malofte fariĝintan idealismon. La juna, ĉarma grafidino sentis por li entuziasman amon, ja eĉ adoron; ŝiaj gepatroj estis feliĉigataj, vidi, ke ilia filino venis en pli favorajn cirkonstancojn ol ili kapablis doni al ŝi. Ĉiu esperado kaj dezirado, ĉiu feliĉo de senzorga estonto estis enŝlositaj en la neĝblankaj, delikataj manetoj de la knabino. Tial ili ankaŭ ne estis kontraŭ tio, se la intimajoj de la juna paro iomete transiris la kutiman konvencian limon, kiun la etiketo kaj la societa bontakto de tiuj sferoj estas fiksintaj. Ju pli la ambaŭ neoficiale gefianĉiĝintoj proksimiĝis unu al la alia, des pli forte ekbrulis la flamo de iliaj koroj. Sed meze en la ĝuegoj de ĉi tiu amoprintempo forta bato trafis la junan majoratulon; lia patrino sekvis al la patro en la tombon kaj postlasis lin sola. En ĉi tiuj malgajaj tagoj de sincera sufero la knabino fariĝis oferema konsolantino, kiu ne laĉigis heligi la malgajan menson de la karulo. Kaj ŝi tion tiel bonege komprenis. Ofte per mallonga kanteto, kiun ŝi sciis kanti per rava voĉo kaj kun plej profunda sentimentesprimo kaj kiu tiel mirinde kvietigante sin flate altrudis kiel balzamo en lian animon. Ĉiam denove ŝi devis ĝin kanti por li tiel, ke teksto kaj melodio enradikiĝis en la animo simile al neperdebla talismano de trankvila feliĉo. Tiel ankaŭ vane resaltis de li ĉiuj provoj, kiujn multnombraj knabinoj kaj sinjorinoj el la societo faris, por lin gajni al si kaj forkapti la „multŝancan" partion de la malriĉa grafidino. Sed ankaŭ la bela kaj ege muziktalenta knabino estis adorata, speciale de tiuj viroj, kiuj post malbonaj spertoj serĉis virtan estajon, ĉar ili posedas sufiĉan monon, por kompensi per ĝi la proprajn flankensaltojn kaj tiel certigi sian prapatran blazonon per la senmakuleco de sia pli bona duonulino. Inter ili estis lerta intriganto, kiu estis kompreninta ruze akiri la plenan fidon de l' juna majoratulo, per amikajoj kapti lian koron kaj sin igi eĉ multnecesa en kelkiuj demandoj. Dua „Jago", kiu ludis sian rolon pli bone ol kelkiu sur la scenejo, kiu signifas la vivon. Nur kun la diferenco, ke li sciis sin pli bone gardi ol tiu. Lia grandega ruzeco sukcesis ludi kun la paro duoblan rolon, en kiu lin helpis la kredemo de ambaŭ kiel ankaŭ la natura pasiemo kaj ĵaluzo

Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj.

Logtrajno kaj laŭtparolilvagono. Varbofilmo.

Vintrosporto Schneeberg

←

La klišoj de Oest. Verkehrswerbung.

Rax ambaŭ proksime al Wien

→

Jam de kelkaj jaroj Oesterreichisches Verkehrsbureau aranĝas la popularajn „Surprizvojaĝojn". Tiu nomo devenas el tio, ke aĉetante la bileton por finsemajnveturado sur la Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj oni ne scias, kien oni venos, ĉar tio estas la „surprizo". Ekzemple en la lasta tia ekskurso la trajno veturigis 500 skikurantojn la unuan fojon en 15 sport-dorm-, 1 bufed-, 1 lud- kaj kelkaj personvagonoj en la regionon de Schladming. La trajno havis rekordlongon de 260 m kaj pezis pli ol 300 tunojn. 2 lokomotivoj veturigis ĝin preskaŭ sen dumvoja halto en la stirian neĝoparadizon. La partoprenantoj dormis komforte, envolvitaj en kovriloj, sur siaj 2-ŝilingoj-dormlokoj (6 en unu kupeo) kaj matene oni estis en la belega vintropejzaĝo. Dum la reveturado lud- kaj bufedvagonoj estis multvizitataj.

Alia surprizo: Ĉe unu tia vojaĝo en trajno kun modernaj du-kupeaj vagonoj estis laŭtparolilinstalajo kaj en ĉiu vagono estis 2 laŭtparoliloj, funkciigataj de sendilvagono, al kiu ekstere estis ankaŭ laŭtparolilo, por inviti en la stacioj la vojaĝantojn, ekupi siajn sidlokojn. Oni aŭskultigis klarigojn pri la travojaĝata regiono, informojn, konsilojn pri ekipo, veterraportojn el la regiono de la celstacio. Sed pere de la laŭtparolilinstalajo oni ankaŭ povas voki kuraciston en certan vagonon, oni konatigas perdojn kaj trovitajojn kaj oni ankaŭ ludigas muzikdiskojn.

Sed la plej nova estas laŭtparolil-aŭtomobilo, kiu kunveturas sur aparta plataj-vagono. En la finstacio oni ĝin devagonigas kaj tiam povas venigi la vetureblan radio-sendilon kun laŭtparolilo ĉien, ĉu al iu aranĝo en kaŝita valo ĉu al skio-vetkurado ĝis la kurejo. Tiel Oesterr. Verkehrsbureau havas ankaŭ sian propran **miniatur-Bisamberg-sendilon.**

La 11. februaro en la aŭstriaj kinoteatroj estos montrata la nova varbfilmo de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj **„La memorinda veturado en la blankan regionon de Justinian Stiglmaier".** La nova filmo parolu en la lingvo de la popolo al la popolo kaj montru en deca maniero la instalajojn de Oest. Bundesbahnen por la vintrosporttrafiko kun ĉiuj agrablajoj. Vico da vintrosportscenoj, en la fundo belegaj pejzaĝbildoj, eniĝas en la gajan agon kaj donas al la filmo la karakteron de efika varbado por la ideala vintrosportregiono en la aŭstria alparo. La ĉefaktoroj Fritz Imhoff kaj Rudolf Carl bonege kapablas meti la publikon en bonhumoron.

Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj provas per tio iri novan vojon de varbado, kiun iniciatis la prezidanto, iama ministro **Fritz Stockinger** kaj ĝeneraldirektoro **Schöpfer.**

Krizo de la Ligo de Nacioj?

„La milito estas hombučado."

Papo Benedikto XV-a, kies 16-an mortotagon ni memorigis la 22-an de januaro.

„Post la ĝenerala restarigo de la ordo laŭ justeco kaj amo kaj post rapaciĝo de la nacioj estus plej dezirinde, ke ĉiuj ŝtatoj, rezignante je reciproka suspekto, unuiĝu en unu societo aŭ pli bone en unu familio de nacioj, tiel por garantii ilian propran liberecon kiel por defendi la ordon de la homaro. Tiu **Ligo de Nacioj** estas necesa (!!) — por ne paroli pri multaj aliaj kaŭzoj — pro la ĝenerale sentita bezono, fari ĉiujn klopodojn, por forigi aŭ malpliigi la terurajn militajn elspezojn (!!), kiuj ne plu estas tolereblaj; por malobligi estonte teruregajn militojn aŭ almenau laŭeble forigi ilian eblecon; por certigi al ĉiu nacio

---

de l'viro. Al daŭra kuniĝo nenio plu kontraŭstaris ol la funebra limtempo. Jen neatendite eksplodis la milito. Antaŭ ol ankoraŭ la necesaj dokumentoj estis havigitaj, la mobilizordono estis tireginta la fianĉon for de lia fianĉino. Oni disiris kun la intenco, aranĝi la sopiritan geedziĝon tuj ĉe la unua forpermeso, kiam eĉ nur la plej ebla ekazo prezentiĝus. Ili tiam ne sciis, ke la disiĝo detruis ĉiujn pontojn, kiuj estis en siaj fundamentoj subfositaj ne de l' morto, sed — kio estis pli tragika — de ruza egoismo kaj perfido al la amiko. Konfideme la foriranto volis anstataŭi la ne-certecon de leterinterŝanĝo per la amika servo de korkonfidulo — li zorgu por tio, ke la informoj de kaj al la militkampo certe venu en la manojn de la geamantoj. La friponeco triumfis. Ĝi sciis trovi sufiĉajn rimedojn kaj vojojn malfirmigi la reciprokan interkonsenton per ĉiu ruzego de abismoprofunda malico, trompi per ŝtelo de leteroj kaj per krimaj, mensogaj agoj la malproksimulojn, ĝis kiam ĝi unutage ekiniis la semaĵon matura, fari la lastan katastrofan baton, kiu devis rompi ĉiujn tigojn de granda korkuniĝo.

Veninte en kaptitecon, for de ĉiuj novaĵoj el la hejmlando, for ankaŭ de ĉiu ebleco de kontrolo kaj certigo de erariga fakto, la militkaptito en la stepoj de Siberio, dume per la militaj okazaĵoj perdinta siajn hejmon kaj bienon, kiu estis forbrulinta, ne volis kredi ebla, kion li ankoraŭ estu perdinta. — Kaj tamen dum miloj da turmentaj doloroj ĉiam denove li devis ripeti tion, ĉar la amiko ne plu lasis lin en dubo pri tio: la amata, juna, ĉarma grafidino, lia adorata fianĉino, kiun malamika sorto estis tireginta for de lia koro, fariĝis malfidela al li kaj donacis sian manon al alia, pli feliĉa viro. Kaj kion ĉiu malbono ne povis atingi, ĉi tiu unusola penso plene lin malsanigis kaj malesperigis lin je ĉio. Li tiam certe estus sin mortiginta, se ne lamiga apatio lin estus kaptinta kaj se ne malfeliĉ-kunuloj estus sciintaj mildigi sian propran mizeron per komuna sorto. Sed hejme li estis konsiderita ne plu trovebla....

Tiel pasis monatoj, jaroj, apenaŭ vivetis en li ankoraŭ espero, ĝisvivi pli bonajn tagojn.

*

Sed fine venis la liberiĝo. Inter la lastaj transportoj de militkaptitoj ankaŭ li troviĝis; post longa, peniga vojaĝo, dum kiu la febro estis atakinta lin per nova forto, oni albordiĝis en Eŭropo. Dolorplena fervojvojaĝo venigis lin poste en la ĉefurbon de lia hejmlando, kie oni lin tuj pro lia rapida fortokolapso transportis en la malsanulejon. Tio ĉio ŝajnis al li nun kiel longa, timiga sonĝo, el kiu vekiĝinta li nun rigardis en la teruran malplenon de necerta, malgaja estonto. Li fermis la okulojn. Nur dormi, dormi sen vekiĝo, tio certe estus la plej bono por li ... Kaj kvazaŭ bona Dio ankaŭ volis plenumi lian deziron — apenaŭ pensitan — li refalis en profundan, sensoĝan dormeton.

Kiam li ree vekiĝis, la suno jam staris alte super la tegmentoj de la urbo — klara, sennuba tago bluis super ĉiuj ĝojoj kaj doloroj de la homoj. Sed ene, en la loko de kuracista arto kaj bonfara kompato bona mano estis zorginta por la malsanuloj

interne de ĝiaj justaj limoj sendependecon kaj neŭtralecon.

Necesa estas honesta interkonsento por malgrandigi la armadojn samtempe kaj reciproke laŭ starigotaj regulo kaj garantioj ĝis grado, kiu estas necesa kaj sufiĉa por gardi la publikan ordon en ĉiu ŝtato.

Por la Sankta Seĝo la sola sistemo, kiu estas efika kaj kiu ankaŭ kun iomete da bona volo en ambaŭ flankoj estus realigebla, estus jena: per komuna interkonsento inter civilizitaj nacioj forigi devigan militservon (!!). Anstataŭ armeoj estas akcelinda la starigo de arbitracio kun sia alta paciga tasko kaj interkonsentotaj normoj kaj kun sankcioj (!!) kontraŭ iu ŝtato, kiu rifuzos submeti konfliktojn al la arbitracia juĝo aŭ akcepti decidojn." — Jen laŭvorta teksto el la pacpropono de la Sankta Seĝo sub papo Benedikto XV-a al la militantaj potencoj dum Aŭgusto 1917, kiu koncize kaj klare skizis la projekton de **vera Ligo** de **Nacioj** kaj **Malarmado,** konsiderindaj ĝuste nuntempe, kiam oni diversflanke povas aŭdi, ĉu justajn aŭ maljustajn plendojn kaj ridindigojn pri la Ligo de Nacioj kaj malarmado, kies **ideoj** devas esti akceptataj kaj alcelataj de ĉiuj kulturaj homoj. Ne ridindigi, forigi, sed **reformi, plibonigi, tio** estas nia tasko kaj laŭnecesa sinteno rilate al la nuntempe certe sufiĉe mankhava, neperfekta Ligo de Nacioj. Ĉu ne ĝuste ankaŭ **lingva unueco** pere de Esperanto povus speciale utili, kunhelpi al tia reformo treege necesa?

W. Mudrak.

Ĉu vi jam havigis al vi

TUTMONDAN ADRESARON DE LA ESPERANTISTOJ 1938?

Legu la gazetojn, kiuj priskribis ĝin, kaj vi certe ankaŭ deziros ĝin posedi!

Jen kion skribis **„Nia gazeto"**: „Ni salutas kun simpatio kaj ŝato tiun Adresaron, kiun jam delonge bezonis la Esperantistaro. Kompreneble la unua eldono, kiu bele prezentita sub ĝia trikolora kovrilo kuŝas sur nia tablo, ne enhavas la nomojn kaj adresojn de ĉiuj esperantistoj en la mondo. Sed ĝi jam enhavas konsiderindan kvanton da ili, pli ol kvin mil, kaj tiel aspektas ampleksa kaj utila. La sekvantaj eldonoj estos certe pli kompletaj, sed tio dependas de la esperantistoj mem, al kiuj ni direktas varman instigon, ke ili enskribiĝu en la Adresaron. Estas ilia **propra intereso,** same kiel la intereso de la **ĝenerala propagando.** En la Adresaro oni trovas ne nur nomojn kaj adresojn de privataj esperantistoj, sed ankaŭ sciigojn pri la esperantistaj asocioj, organizoj, entreprenoj kaj ... gazetoj. La listo de tiuj lastaj estas vere impona: ĝi entenas 202 gazettitolojn kun la respondaj adresoj. Terure! Vere estas, ke inter tiuj gazetoj oni trovas grupbultenojn kaj eĉ circulerojn; tamen restas almenaŭ 160 esperantaj gazetoj! Tio igas nin admiri la legoforton kaj la abonkapablon de niaj samideanoj!

Aĉetu la nunan adresaron, kaj, tio estas grava, **aliĝu tuj al la Adresaro por 1939.** La prezo estos **2 angl. ŝ** por la aliĝintoj antaŭ la 1-a de julio 1938. Mendante la libron **vi rajtas senpagan enpreson de viaj nomo, profesio, adreso;** skribu tion tre legeble, se eble per skribmaŝino."

Kaj **„Heroldo de Esperanto"**:

„Bonega adresaro estis ĉiam la Jarlibro de la Esperanto-Movado, en pli fruaj jaroj eldonita de UEA (nun tiu de IEL). Sed ĝi donis kutime nur la adresojn de la delegitoj kaj aliaj ĉeffunkciuloj de nia movado, kaj tiujn de granda parto de l'esperantistaj grupoj. Tamen ofte oni deziris havi adresaron, kiu enhavus ankaŭ adresojn de aliaj gesamideanoj. Tial estas subteninda la klopodo de kort. konsilanto Steiner, havigi al la esperantistaro adresaron kun kiel eble plej multaj adresoj.

La **unua eldono** de tiu adresaro nun aperis. Kiel klarigas ĝia kompilinto mem, ĝi estas nur kerno, el kiu poste devos elkreski arbo, riĉa je branĉoj kaj folioj. Sed ankaŭ la „kerno" estas jam riĉeta kaj valora: ĝi enhavas 5743 adresojn el 2565 lokoj en 106 landoj de ĉiuj kontinentoj. Estas projektate, ke la venonta eldono, aperonta akurate je la naskiĝtago de la majstro (15. 12. 1938) enhavu **minimume 200 paĝojn** kun 10.000 adresoj kaj evitu diversajn neperfektajojn de la unua eldono. La **dua eldono** kostos por **antaŭmendantoj** ĝis fino de junio 1938 **egalvaloron de 2 anglaj ŝilingoj** (la adreso de antaŭmendantoj estas presota senpage)."

Krome aperis recenzoj jam en **„La Praktiko"**: „Granda adreslibro de esp-istaj organizajoj kaj individuoj ..."

„The British Esperantist": „Post la lasta volumo de Tutmondo Jarlibro Esperantista (1913—14), eld. de E. C. O. en Parizo, mankis al nia movado adresaro tutmonda, kun escepto de la Jarlibroj de UEA. kaj IEL. kaj la Adresaroj de BES., ĉiuj iom fakaj. Ni do povas saluti la aperon de ĉi tiu volumo kaj deziri al ĝi bonan akcepton kaj daŭran vivon.

Estus sendanke kaj senkomprene kritiki detalojn aŭ konstati, ke kelkaj adresoj donitaj estas neĝustaj aŭ ne plu aktualaj, dum mankas aliaj. Ĉiu, kiu konstatas neĝustaĵojn aŭ mankojn, sendu korekton aŭ plenigon (kun sia aliĝo) por la proksima eldono (en dec. 1938), kiu kredeble havos grandon duoblan. Dume ni akceptu la volumon kaj ĝin uzu kun danko; ĉar la kompilo de unua eldono de tia volumo estas verko herkulesa."

Ni aldonas: La adresojn ni parte ricevis de mendantoj, parte de Landaj Organizoj (nur malmultaj helpis kaj respondis nian peton pri helpo) parte el la membraro de IEMW (el ili kelkaj adresoj ŝanĝitaj ne estis anoncitaj al ni!) parte el la grup-adresmaterialo de la Muzeo. Por la venonta eldono kunhelpu ĉiuj Landaj Organizoj, ĉiuj grupoj, ĉiuj samideanoj — kaj vi ricevos grandiozan verkon neriproĉeblan! Sed nun ne kritiku, sed helpu kaj pripensu, kian grandan laboron kaj kiun riskon ni havas kaj — mendu Adresaron 1938 kaj same Adresaron 1939. Steiner.

Longaj artikoloj en naciaj gazetoj pri TUTMONDA ADRESARO 1938:

„Venstres Folkeblad", Soró og Omegn, Svedlando (11. 1.); **„Zara"**, Sofia (22. 1.); **„Arbetaren"**, Stockholm (26. 1.); **„Karlskoga Tidning"**, Karlskoga, Sved. (4. 1.); **„Karlskoga Bergslag"**, Karlskoga (7. 1.).

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN.

Wien, I., Neue Burg (iama imperiestra kastelo), **Aŭstrio.**

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrio s-ro Wilhelm MIKLAS.

Fondinto kaj direktoro: kortega konsilanto Hugo Steiner.

Fondita 1927, **inaŭgurita** 1929.

Memstara sekcio de Nacia Biblioteko (iama Kortega Biblioteko).

Celo: Estante super ĉiuj partioj kaj mondperceptoj IEMW ne estas organizo, sed Instituto, kiu servu al ĉiuj mondhelplingvanoj, unuavice al la esperantistoj, de kiuj 98% de la muzea-materialo venis. Ĝi **kolektas** kaj **konservas** ĉiun materialon, kiu koncernas la mondhelplingvan demandon, **enkatalogigas** la materialon, **disponigas** ĝin al nia movado kaj al sciencistoj kaj studemuloj.

---

por faciligi kaj agrabligi al ili la longajn horojn de kuŝado kaj atendado: Ĉe la tablo en la ĉambregmezo staris la laŭtparolilo de radio-aparato kaj igis fluegi en la korojn de la suferantoj la muzikon, la fortan konsolantinon en ĉiu doloro de la korpoj kaj de la vunditaj koroj. Tiel ankaŭ nun sonis ree ĉarma melodio el la sorĉinstrumento kaj ĝojigis la aŭskultantojn. La hejmenreveninto instinkte aŭskultis la kantojn, sen trovi la ĝustan intereson je ili. Jen subite okazis io neatendita, kio ĉiujn ĉeestantojn forte ekscitigis. La hejmenreveninto eksaltis sur sia kuŝejo, rigardis per teruritaj okuloj ĉirkaŭ si kaj ŝovis sian kapon per ĉiu al li restinta forto al la laŭtparolilo kvazaŭ li volis ekvidi tiun inon, kiu nun post la aŭdebla anonco komencis sian kanton. Kaj kiam la sonoj simile al perloj el nevidebla konko en la malprofundo suprenvenis al la helo, jen konvulsia plor-singulto skuis la ruinigitan korpon de la malfeliĉulo kaj larmaro fluegis el liaj okuloj. Poste li kuŝis senmove kaj aŭskultis kun retenata interna ekscitiĝo ĝis kiam la kanto estis finsoninta. Poste li ne povis pli longe resti en la lito — kvazaŭ furioziĝinta li elsaltis per siaj lastaj fortoj ŝancelatis kelkajn paŝojn en la direkto al la pordo de la ĉambrego, kie li ŝanceliĝante teren falis. La ĉeestantojn kaptis timo kaj teruro. Kiom rapide oni nur povis, flegistoj kaj kelkaj pacientoj portis la furiozulon en apartan ĉambron, kie oni lin, kiu kondutis kiel freneza, provis trankviligi, kio sukcesis post pli longa penado. La alvokita kuracisto opiniis unue, ke tio estis febrodelirio. Sed baldaŭ li konvinkiĝis pri alia, kiam li aŭdis el la buŝo de la hejmen-reveninto la kaŭzon de lia furioza ekscitiĝo. La kanto, kiu lin preskaŭ estis kondukinta al frenezeco, estis la kanto de pasintaj, feliĉaj tagoj ... la kanto, kiun kantis al li iam la karulino ... li ĝin estis ekkoninta. Kaj kiu ĝin kantis, estis la sama, kiu ĝin estis kantinta iam por li ...

*

En gazetnoto de la sekvinta tago estis legeble, ke radiodisaŭdigo kaŭzis en la urba malsanulejo scenon, kiu emociis ĉiujn ĉeestantojn plej profunde. Sed la stato de la bedaŭrinda grave malsanulo, kiu neniu estis alia ol la laŭdire ne plu trovebla bienposedanto, kiun oni jam delonge opiniis morta, baldaŭ pliboniĝis, se ankaŭ nur estas malmulta espero, kuraci lin de la suferitaj laciga joj. La saman tagon ankoraŭ deziris la fama, kantistino, kiu tiam estis kantinta la kanton, esti kondukata al la malsana hejmen-reveninto. Ĉi tiu dume estis sciiĝinta, ke ŝi dediĉis sin al la operkariero kaj restis fraŭla.

Je ŝia insista peto la kuracistoj ne plu rifuzis al ŝi la vojon al la suferanto. Ĉi tiun malgrandan revidoĝojon oni ja povus lasi al la ne plu savebla homo ... Estis la lasta granda ĝojo de estingiĝanta vivo. Post nur malmultaj semajnoj ege vualita sinjorino ornamis la tombon de la bedaŭrinda hejmen-reveninto per superriĉa rozfloraro. Sed la kanto el la junaĝo neniam plu venis trans ŝiaj lipoj, en la plej profunda angulo de ŝia koro ĝi restis entombigita, kaŝita por ĉiam. Estus ŝajnanta al ŝi kvazaŭ profanado, ĝin kanti ankoraŭfoje ...

E-igis H. Steiner.

NOVAJ FILMOJ

Apollo-Kino prezentos en februaro du filmojn, ambaŭ taŭgaj veki la intereson de la publiko. La unua estas **„La Habanera“**, en kiu **Zarah Leander** ludas la ĉefrolon:

Loge, incitege kaj tente sonas la Habanera. Kiel paradizo surtera, insulo de la feliĉeguloj situas Puertorico antaŭ la okuloj de la bela svedino Astrée Sternhjelm. Ĉiam vivi ĉi tie en suno kaj feliĉo, aŭskulti la Habanera per la animo, kiel bela devas tio esti — tiel entuziasme parolas Astrée. Ŝia onklino Ana vidas la aferon tute alie, ŝi nur vidas varmegan insulon proksima al ekvatoro kun malpuraj homoj, hoteloj sen komforto. Ŝi sopiras al la malvarmeta Stockholm. — Dum veturado ili venas al vilaĝa festo „Corrida“. Ana volas reveturi, sed Astrée restas kaj travivas tremante la ekscitan atmosferon de bovobatalo. La patrono de la vilaĝo Don Pedro de Avila kondukas ŝin en la honorloĝion. — La batalo komenciĝas, sovaĝe estas la virbovo. La toreadoro estas juna kamparano, la furioza virbovo minacas lin mortigi; jen saltas Don Pedro en la arenon, la longa spado brilas en lia pugno, morta kuŝas la virbovo kaj la spado kliniĝas salutante antaŭ Astrée. Heroo estas Don Pedro ... Ana avertas vane antaŭ ĉi tiu vilaĝtoreadoro. Astrée amas lin. Kiam la vaporŝipo forveturas al Svedujo, Ana estas sola, Astrée refugis en la lasta momento al la insulo, en la brakojn de Don Pedro. Forte sonas la Habanera, Astrée estas feliĉa. — Dek jaroj pasis. La feliĉrevo de Astrée longe jam forflugis, sed ŝi estas tro fiera por lamenti. La virinoj el la gento de Sternhjelm preferas morti ol konfesi eraron, diras onklino Ana, kiam en Stockholm konato de junaĝo d-ro Sven Nagel demandas pri Astrée. La nomo Puertorico estas elparolata. Tien ja d-ro Nagel volas veturi, por fine eltrovi la ekscitanton de la febro, kiu ĉiujare postulas centojn da viktimoj kaj estas nomata Puertorico-febro. D-ro Nagel gvidos la esplorkaravanon. Kaj je tiu okazo li revidos Astrée — sian karulinon el junaĝo. Neniu escepte Astrée mem scias, kiel teruraj estis la dek jaroj de ŝia edzeco. Don Pedro, diktatora kaj aroga, gardis ŝin kiel kaptitinon kaj kiam li rimarkis, ke ŝi deglitis lin, li ja estis korekta sed frosta kaj sarkasma. Krome la terura klimato, la ĉiujare revenanta febrovento, kiu mortigas centojn, kio estas kaŝita laŭ ordono de Don Pedro, por ne malutili la komercon. Don Pedro regas sur la insulo kiel tirano kaj li ankaŭ devigos ĉi tiun fieran nordlandaninon, kiun li malamas kaj tamen pasie amas. — La Habanera finsonis por Astrée kaj anstataŭ ĝi ŝi kantas por sia naŭjara knabo antikvajn svedajn infankantojn, kiuj rakontas pri vintro kaj neĝo. Kiel bela devas esti la vintro ... La patrino volas veturi kun li en la vintron, al la hejmlando. — Bruske Don Pedro malpermesas la vojaĝon. La biletojn ja povos uzi la sveda doktoro, kiu venis sur la insulon, por eltrovi la Puertorico-febron, kiu entute ne ekzistas. — D-ro Nagel estas veninta jus kiam la febro komenciĝis. Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, kiujn oni faras al li, li sukcesis, ricevi sangoprovaĵon kaj fari seron. Zorgeme li gardas la trezoron en sia hotelĉambro, kiun li bedaŭre devas forlasi, por sekvi inviton de Pedro. — Li staras antaŭ Astrée; unu rigardo en ŝiajn okulojn malkovras al li la sekreton pri dek teruraj vivjaroj. Profundan kompaton kaj ardan amon li sentas por ŝi, kiu klopadas gardi almenaŭ ŝajnon de feliĉo. Kun malamo kaj ĵaluzo Pedro rigardas la interparolon de ambaŭ. La edzino volas lin repacigi kaj kantas la Habanera, la favoratkanton de Pedro ... jen li subite scias, ke li ĝin aŭskultas la lastan fojon. Antaŭ liaj okuloj turniĝas la salonego, la febro komenciĝas. Sveninta li teren falas. D-ro Nagel deziras helpi. La seron! Sed tion Pedro mem pereigis helpe de siaj subuloj. Don Pedro mortas. — En brilo kaj suno estas la fea insulo, kiam Astrée kun sia infano kaj d-ro Nagel reveturas al sia hejmlando. Mallaŭte finsonas la Habanera.



Don Pedro — Ferdinand Marian

Zarah Leander
deseg. Neumann-Ufa

La dua filmo estas de amerika deveno kaj titoliĝas **„La perdita paradizo“.** Ĉi tiu filmo, enscenigita de Frank Capra, la genia kreinto de la filmo „Mister Deeds iras en la urbon“, sensacie sukcesis cie, kie li ĝis nun estis montrata.

Kian materialon ni kolektas: librojn, broŝurojn, katalogojn, gazetojn (ankaŭ unuopajn numerojn por kompletigo), fotojn, gvidfoliojn, propagandilojn, afiŝojn, ĝlumarkojn ktp., do **ĉion ĉu en aŭ pri** Esperanto aŭ iu ajn mondhelplingva sistemo kiel Volapük, Ido, Occidental ktp.

IEMW estas **Centra Statistikejo,** tial sendu ĉiujn novaĵojn al ĝi. Sed tial ankaŭ sub **„ĝiaj aŭspicioj“** aperis la **15. de decembro 1937** la **UNUA** volumo de

TUTMONDO ADRESARO de la ESPERANTISTOJ 1938, kiu enhavas la E.-organizojn kaj grupojn kaj pli ol 5000 adresojn de s-anoj en 106 landoj. Eldonis ĝin nia direktoro Steiner (Bisamberg, Bundesstraße n-ro 154; **leteradreso** Wien, I., Neue Burg), de kiu ĝi estas ricevebla kontraŭ alsendo de 4 poŝtrespondkuponoj.

TUTMONDO ADRESARO (2. volumo) **1939** aperos la **15. de decembro 1938.**

Kiel subteni la Muzeon? — 1. sendante materialon, kiu estos kvitancata kun danko; 2. fariĝante **DUMVIVA MEMBRO.**

Kiel fariĝi DUMVIVA MEMBRO? — Simple pagante la samvaloron de **sv. fr. 17.—** unufoje por ĉiam, per **ĉeko al Viena Banko aŭ per 34 poŝtresp. kup.,** por kio vi ricevos 1. membrokarton, 2. kvar fotojn pri la ekstero kaj interno de la Muzeo, 3. gvidlibron pri Wien (60-paĝa, ilustr.), 4. gvidlibron „Tra Aŭstrio“ (80-paĝa kun multaj bildoj), 5. „Paroladojn en la XII. Somera Universitato“ aŭ „Albumo pri Wien“ (pli ol 100 bildoj kun E.-klarigoj), 6. TUTMONDA ADRESARO 1938, 7. gvidilojn, 8. numeron de „Aŭstria Esperantisto“, en kiu estas enpresata la publikigo pri la aliĝo. **Aliĝu tuj kaj per tio ankaŭ mone subtenu nin!**

Al demandoj ĉiam aldonu **respondkuponon!**

Por **Internacia Esperanto-Muzeo:**
Steiner, direktoro.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Wien.

Programo en februaro kaj marto:

Statoperejo: „Dalibor“ (Smetana), „Die Kathrin“ (Korngold), „Land des Lächelns“ (Lehar), „Iwan Sergejewitsch Tarrasenko“ (Salmhofer).

Burgtheater: „Die schöne Welserin“ (Josef Wenter, unua prezentado), „Herodes kaj Marianne“ (Hebbel), „Malsanulo pro imago“ kaj „Malavarulo“ (Molière, novenscenigo), „Michael Kramer“ (Gerh. Hauptmann, unua prez.), „La standardo flirtas“ (Karl Schönherr, unua prez.), „La komplikulo“ (Hofmannsthal, unua prez.), „Julius Cäsar“ (Shakespeare), „Penthesilea“ (Kleist, ambaŭ novenscenigoj).

En **Theater in der Josefstadt, Deutsches Volkstheater, Scala, Kammerspiele, Bürgertheater, Volksoper** kaj en la diversaj kabar-

edoj, „arto en malgranda kadro“ — scenejoj kaj varieteoj diversspecaj novaĵoj.

La muzikprogramo en la diversaj famaj koncertejoj estas ampleksa kun unuarangaj solgekantistoj, direktantoj de mondfamo, Philharmoniker, horaro de ŝtatoperejo ktp.

Vintrosporto: Sur la du grandaj glitkurejoj la glitsporto kaj en la proksima ĉirkaŭaĵo skiado, same sur Semmering, du horojn per fervojo de Wien.

Trotkurado en Krieau en Wien.

Gold-ludado komenciĝas fine de marto.

Festsemajnoj: Ni jam nun atentigas pri ĉi tiu ĉiujara grandioza aranĝo, kiu nunjare okazos de 1.—19. de junio.

Ankaŭ ĉijare Esperantoprospekto pri Wien, aldonota al la marta numero!

Informojn pri ĉiuj aranĝoj ankaŭ en Esp. ĉe Fremdenverkehrsstelle der Stadt Wien, Wien, VI., Mariahilferstraße 2.

Viena Foiro

Dufoje ĉiujare eldonas E-varbilojn, ĉiam en bela eksteraĵo. Ankaŭ por la Printempa Foiro 1938 (13.—19. marto) eliris belaj prospektoj. Unu ekzemplero aldonita!

Salakvobanloko Hall en Tirol.

Al la novaj prospektoj germanaj estas aldonita en Esp. alvoko al „Skikursoj per Esperanto en la skilernejo Hall Tirolo“. Por esperantistoj raabtita prezo de aŭ š. 12 por la tua kurso. Informojn ĉe Erwin Vorlaufer, skiinstruisto, Hall, Hotel Geisterburg, Tirol.

Oesterr. Hotelbuch (Aŭstria hotellisto) 1938, eldonita de Oesterr. Verkehrswerbung de Ministerio por Komerco kaj Trafiko, enhavas tabelokapon ankaŭ en Esperanto.

Novaj Esperanto-prospektoj:

Oesterr. Verkehrswerbung de Ministerio por Komerco kaj Trafiko en Wien
Fremdenverkehrsstelle de Urbo Wien
Viena Foiro.

Ĉiujn iniciatis kaj tradukis „Esp.-Varbadservo por Aŭstrio“, kie ĉiuj kune estas haveblaj kontraŭ alsendo de 1 resp. kup. por repago de la elspezoj. 1 numero de Aŭstria Esperantisto aldonota! **Wien, I., Neue Burg.**

EL LA LEGANTARO

Estimegata sinjoro kort. konsil. Steiner.

Vi bonvolis gratuli min en mia sesdeka datreveno kaj Via nomo estas sur diplomo, kiun mi ricevis — laŭ diro de mia vidanta asistanto. Senlima estas mia dankemo al Vi, ĉar mi ne meritas tian honoron kaj afablecon. Dankon!

La Adresaron mi ĝoje ricevis kaj dankas.

Estimege, senlime dankante
Harald Thilander, Stocksund.

„...La Adresaro jam montris sukcesan efikon, alvenis jam utilaj skribaĵoj por „Verda Kruco“ ... **W. Mudrak, Wien.**“

„...Mi gratulas Vin pro la grandega sukceso plenumi tiel gravan entreprenon. Mi mencios ĝin en niaj organoj, svedaj kaj alilandaj kaj do speciale en Informa Bulteno. ... **Adriano, Stockholm.**“

„...Mi gratulas vinpro la eldono de la Adresaro, ĉar tiu libro certe estas, post longa tempo, tre sentata bezono, mi deziras al vi grandan sukceson... **Fritz Carlsson, Eriksberg, Svedujo.**“

„Mi estas tre kontenta pri la unua eldono de la Adresaro kaj ĝi certe multe utiligos por la esperantistaro. Mi kore esperas, ke ĝi ĉie trovos la vojon por pli mallarĝigi la de ĝis nun tro vastajn kaj nekonatajn terenojn, ĉar per la Adresaro ni nun pli bone ekscias la adresojn, pri kiuj ni antaŭe ne sciis iom. Sed tamen estos eble pligrandigi la adresaron kaj kompletigi ĝin per aliaj aldonoj, kiuj certe povos esti utilaj por ni ĉiuj. Pri tio mi ankoraŭ skribos... En la nomo de la grupo mi esprimas mian tutkoran dankon pro la multega laboro kaj klopodoj, kompili la adresaron... **EG. de Internacia Federacio de Esp. Trafik kaj Transport Laboristaro,** sekcio Holland, en Rotterdam, sekr. A. H. v. Loon.“

„...Mi montros kaj priparolos ĝin en mia klaso. Sukceson al via laboro kaj korajn dankojn... **F. Taylor, Halifax.**“

„Tutmonda Adresaro tre plaĉas al mi, ĝi vere entuziasmigis min pro ĝia enhavo kaj aspekto. **Magnus Weisflog,** Scheibenberg.“

„Al nia fame konata samideano Hugo Steiner mi ĉiloke devas precipe danki, ekzistas homoj en Esperantujo, kiuj ne nur laboregas sed laboregadas por Esp. Ili estas sukcesaj kaj akcelas Esp-on kiel malofte iu homo; ili estas brilegantaj steloj je la verda ĉie'o, nomoj kiel Cseh, Scherer, Wüster estas neforgeseblaj por ĉiu esperantisto, ne laste la nomo Steiner. Unuflanke ili estas enviindaj, feliĉaj, ĉar ĉu ne estas feliĉigante labori por sia idealo, por la bono de la homaro? Ili daŭrigu kaj ne laciĝu, multaj miloj de samideanoj helpas ilin. Ni helpas ĝis la venko estas nia! **Max Brückner,** Bayrischzell.“

„...samtempe mi sendas fotaĵon, kiun mi faris en Varsovio de vi ĉe la tombejo de la Nekonata Soldato. Estas por mi granda honoro, havi en miaj dokumentoj la bildon de la sindonema homo, kiu tiom multe, senlace laboris, penis, baraktis por organizi bele kaj sukcese la 28-an Kongreson en Wien, kiun mi kun la edzino ankaŭ partoprenis. **Paul Joussot,** Vincennes, Francujo.“

„Mi sincere gratulas vin okaze de via granda sukceso kun la adresaro, mi estas treege kontenta kaj intencas helpi vin per kolektado de nomoj por sekvonta adresaro. **Oscar Persson,** Göteborg.“

Letero el la Fratamurbo.

Originala raporto.

La 2-an de januaro el Varsovio alveturis al nia Fratamurbo-Philadelphia en Usono filino de l' Majstro, Lidja Zamenhof.

Kaj jam vespere de l' 8-a januaro en la halo de „Friends Meeting House“ ŝi faris sian unuan propagandaĵon — parolis pri bezono de ideo de internacia lingvo kaj demonstraciis la manieron, kiel plej facile ellerni Esp-on. Granda nombro ĉeestis.

En 4 lingvoj mi verkis salut-versaĵeton (litove, ruse, pole kaj Esp.), jen la Esp.:

Mi vin salutas filin' de l' viro,
Pri kiu sonas jam barda liro
Por lia verko... lingvo, ne kanto,
Ĉie konata jam, Esperanto.
Filin' de l' Majstro, do — Zamenhofo,
Kun intelekto de l' filozofo
De la Hellado, do de Sokrato —
Mi Vin salutas kun la korbato
Kaj kun admiro, fraŭlin' Lidio
En fama urbo Filadelfio;
Aŭ esperante: „Urb-de-frat-amo“ —
Akceptu mian saluton damo
Inda de l' laŭroj kaj de l' estimo
Por via granda nobla animo;
Ero de l' Majstro, do — duondio —
Mi Vin salutas, fraŭlin' Lidio!
En land' de l' fama estr' Vaŝingtono,
Kiun respektas eĉ Albiono;
Kvankam li ĝian kvazaŭe spikon,
For de l' land' nia ĵetis fortikon
Kaj de l' libero ekkantis kanton —
Laŭte reklamu Vi Esperanton
Tie ĉi, inter nia nacio,
Ĉar tia estas ja vol' de Dio!“
Kazis Vidikaŭskas, Philadelphia, USA.

RECENZOJ

The Esperanto-Publishing Co, London.

„Vivo de Zamenhof“ de Edmond Privat, dua eld., 133 pĝ., tole bindita 3 ŝ 6 p., 1937. Afranko 4 p.

Kompreneble la esperantistoj kun plezuro legas la biografion de la elpensinto de Esperanto Majstro Zamenhof. Tial la unua eldono elĉerpiĝis kaj estas dankinda faro de la eldonejo, ke ĝi eldonis la duan eldonon de ĉi tiu verko de nia pioniro Privat.

La libro aperis kun nova antaŭparolo, verkita de Robert Robertson, kun 12 bildoj, inter kiuj kelkaj ne aperintaj en la unua eldono, kaj en bela kovraĵo.

Ni deziras, ke la verko baldaŭ ĝisvivos kelkajn eldonojn.

Eld. Librejo Kaniya, Kioto, Teramati-Ebisugawa. **„Karcero“** de Kensaku Simaki, trad. Redakcio de Tempo. 163 pĝ, 19 je 13 cm, prezo 2 Yen afrankite. 1937. La kovrilo montras ferkradon de karcera fenestro.

Per ĉi tiu libro, kiu enhavas 4 novelojn, la japanaj s-anoj prezentas al la mondo la realan vivon, superhoman suferadon korpan kaj mensan de tiel nomataj pensokrimuloj. La tro realisma desegno kruele trančas en la koron de la leganto. Speciale en la rondo de laborista esperantistaro la libro kaŭzis sensacion. Sed la leganto legas la libreton en unu spiro ĝis la fino! Do ĝi devas esti interesa. Legu ĝin!

Red. E. Weber.

„He, mastrino“, kolere diris la gasto, „tuj prenu la harojn el la supo; se mi deziros harojn, tiam mi mendos ilin mem.“

Pli malmultekoste.

Instruisto: „Johano, kia diferenco estas inter la fulmo kaj la elektra lumo?“

Johano: „Por la fulmo oni ne bezonas pagi.“

Senpripense.

„Ne tiel malbone kondutu, vi juna simio! Mi povus esti via patro!“

Kuracisto: „Ĉu vi havas profundan dormon?“

Paciento: „Jes, s-ro doktoro, mi dormas en la kelo.“

La kuraĝulo.

Suboficiro: „Kiamaniere vi agus, se vi aŭdus la komandon: Libervoluloj antaŭen!“

Rekruto: „Mi paŝus flanken por preterlasi la libervolulojn.“

Aĉetas unu nr-o 1 de Esp-o Int-a. Ofertu poŝtkarte! Resp. ĉiujn per ilustr. poŝtk. H. Peter, Wien, 13., Hofwiesengasse 12, Aŭstrio.

Mi deziras aĉeti poŝtmarkojn de ĉiuj landoj. Sendaĵoj al Paŭlo **Bretet,** 6 rue Chopin, Montrouge (Seine), France.

Kontraŭ 1 resp. **kup. poŝta** vi ricevos 2 **provnumerojn** de Aŭstria Esperantisto (ni **ne donas** dum 4 aŭ 6 monatoj la gazeton **senpage,** ĉar tio estas laŭ niaj leĝoj **malpermesata!)** kaj kiel aldonaĵojn 2—3 novajn Esp.-gvidilojn, bele ilustritajn! Mendu tuj!

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28